

# Informilo por Interlingvistoj (IPI)

Numero 52, 1 - 2005

## Enhavo

<b>1</b>	<b>Aranĝoj pasintaj .....</b>	<b>2</b>
<b>1.1</b>	<b>Sciencaj aranĝoj kadre de la 89-a UK en Pekino 2004 .....</b>	<b>2</b>
<b>1.1.1</b>	<b>Esperantologia konferenco .....</b>	<b>2</b>
<b>1.1.2</b>	<b>La III-a Nitobe-Simpozio .....</b>	<b>2</b>
<b>1.2</b>	<b>Simpozio pri Esperanto kaj ideologio en Vieno .....</b>	<b>3</b>
<b>1.3</b>	<b>Pri “Mondbildo de lingvoj” en Litovio (Povilas Jegorovas).....</b>	<b>4</b>
<b>1.4</b>	<b>Pri minoritataj lingvoj en Ĉeboksaro (Slavik V. Ivanov) .....</b>	<b>5</b>
<b>1.5</b>	<b>La latina lingvo en Eŭropo (Spomenka Stimec).....</b>	<b>5</b>
<b>1.6</b>	<b>14-Konferenco de GIL en Berlin .....</b>	<b>5</b>
<b>1.7</b>	<b>Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) .....</b>	<b>6</b>
<b>2</b>	<b>Aranĝoj estontaj.....</b>	<b>8</b>
<b>2.1</b>	<b>Esperantologia konferenco en Vilno – por junaj esploristoj.....</b>	<b>8</b>
<b>2.2</b>	<b>15-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko 2005 en Berlin.....</b>	<b>9</b>
<b>3</b>	<b>Publikigaĵoj pri Volapuko kaj ĝia kreinto .....</b>	<b>9</b>
<b>4</b>	<b>El la universitata medio.....</b>	<b>11</b>
<b>4.1</b>	<b>Interlingvistikaj aranĝoj en Poznań. ....</b>	<b>11</b>
<b>4.2</b>	<b>Kursaro en la Universitato de Amsterdam (Wim Jansen).....</b>	<b>12</b>
<b>4.3</b>	<b>Studofinaj disertacioj .....</b>	<b>15</b>
<b>4.4</b>	<b>Doktoriga disertacio pri la instruado de Esperanto (Iván Bujdosó).....</b>	<b>16</b>

\*\*\*

# 1 Aranĝoj pasintaj

## 1.1 Sciencaj aranĝoj kadre de la 89-a UK en Pekino 2004

### 1.1.1 Esperantologia konferenco

Kadre de la tradicia esperantologia konferenco, sub gvido de Humphrey Tonkin, estis prezentitaj jenaj prelegoj :

*D-ro Renato Corsetti* : “Simpla, fleksebla, internacia: ĉu la araba aŭ Esperanto?”

*Alain Lauffenburger* : “La koncepto de *lingva milito*”

*Prof. LIU Haitao* : “La lingvistikaj konceptoj de Zamenhof”

*Prof. Geraldo Mattos*: “Verŝajnaj sekvoj de la diasporeco de Esperanto”

*Prof. Zhou Liūi*: “Kiel orientuloj povas ekspluati la gramatikecon de Esperanto?”

### 1.1.2 La III-a Nitobe-Simpozio

La serio de lingvopolitikaj simpozioj ricevis sian nomon de la japano NITOBE Inazo, kiu estis Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, iniciatinto de raporto pri Esperanto, kiu estis diskutita inter 1921 kaj 1924.

La I-a NITOBE-simpozio okazis 1996 (81. UK en Praha) kaj la II-a en la jaro 1999 (84-a UK en Berlino). La III-a NITOBE-simpozio estis aranĝita en la kadro de 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, la 25-an kaj 26-an de julio 2004. Ĝi realiĝis en la lingvoj ĉina, angla kaj Esperanto kaj havis la kadran temon “Al nova internacia lingva ordo” (Towards a New International Language Order).

Estis prezentitaj jenaj prelegoj :

*Prof. Dr. Humphrey TONKIN* (University of Hartford/USA): “Lingva egaleco en internaciaj rilatoj”

*Dr. KOBAYASHI Tukasa* (Tokio): “La lingva Problemo en Ligo de Nacioj kaj NITOBE Inazô.

*YANG Guang* (General Director, Dept. of Language Planning & Administration, State Language Commission, China): “La celo kaj stato de la homa civilizacio: egaleco kaj diverseco de lingvoj kaj kulturoj”

*Michael CWIK* (Economist, European Commission): “Principoj por komunikado ene de multlingva komunumo kiel Eŭropa Unio”

*Prof. SU Jinzhi* (Institute of Applied Linguistics, State Language Commission, China): “Lingva egaleco sur la fono de lingva diverseco”

*Noel MUYLLE* (Director of Translation Service, EC): „Tradukservo ĉe Eŭropa Unio”

*Prof. LIU Haitao* (Beijing Broadcasting University): “Lingva egaleco en internaciaj rilatoj: la rolo de Ĉinio”

*MIYOSHI Etsuo* (World Federalist Movement): “Kunligu Esperanton al Monda Federalista Movado”

*Kimiko SCHWERIN* (Baha’i International Community): „La bahaa vidpunkto pri mondaj lingvaj problemoj”

*Prof. Dr. LEE Chong-Yeong* (Vice President, UEA): “Al nova lingva ordo”

Intertempe aperis la aktoj. Ili enhavas ĉiujn kontribuojn en la angla, Esperanto kaj la ĉina:

*LEE Chong-Yeong/ LIU Haitao* (2004, Red.) : Al nova internacia lingva ordo. Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj pri Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj, 25-26 julio 2004, Pekino, Ĉinio. Towards a New International Language Order. Proceedings of the Third Nitobe Symposium of International Organisations on Language Problems in International Relations, 25-26 July, 2004, Beijing, China. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, ISBN 929017085-9, 239 p.

## **1.2 Simpozio pri Esperanto kaj ideologio en Vieno**

En la jaro 2004 la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno festis la 75-an datrevenon de sia aliĝo al la Aŭstria Nacia Biblioteko. Kaj *Lidija Zamenhof* samjare fariĝus centjara (naskita 1904). Okaze de tio la Nacia Biblioteko de la 7-a ĝis 9-a de oktobro 2004 okazigis internacian simpozion kun la kadra temo "Esperanto en la Uragano de la Ideologioj". Ligita al la simpozio estis ekspozicio en IEMW kun la temo “*La danĝera lingvo. Persekutado de Esperanto sub Hitler kaj Stalin*”.

La ekspozicio estis malfermita jaŭde vespere (7.10.04). La malferman paroladon faris la Ĝenerala Direktorino de la Aŭstria Nacia Biblioteko, *d-rino Rachinger*, kiu unuan fojon vizitis la kolekton. Krome prelegis pri la Muzeo *Mag. Herbert Mayer*. Pri planlingvoj prelegis *prof. d-ro Heiner Eichner* de la Universitato de Vieno.

La programo de la sekvaj tagoj realiĝis jene:

Vendredo, 8.10.04, antaŭtagmeze por germanlingvuloj:

*Herbert Mayer*: “Enkonduko, historia kadro, viktimoj de la persekutado sub Hitler kaj Stalin”

*Christina Köstner*: “La Esperanto-Muzeo kaj la Nacia Biblioteko Vieno 1938-1945”

*Prof. Dr. Heiner Eichner:* “Folk linguistics kaj Esperanto: ĝeneralaj juĝoj kaj stereotipoj pri la *Lingvo internacia* de Zamenhof en pasinteco kaj nuntempo”

Vendredo, 8.10.04, posttagmeze (en Esperanto):

*Herbert Mayer:* “La Internacia Esperanto-Muzeo dum naziismo”

*Prof. Dr. Humphrey Tonkin:* “Kiam generacioj kaj ideologioj kolizias: La Esperanto-movado en la 1970aj jaroj”

*Dr. Detlev Blanke:* “Sur la 'alia flanko' - la Esperanto-movado en GDR inter ŝancoj kaj limigoj”

*Wera Blanke:* “Alimondista movado - ĉu sen ni?”

Vespere:

Omaĝo al Lidia Zamenhof kun anonco de la aperonta “Kolektitaj verkoj de Lidia Zamenhof” (eldonejo IEMW)

Sabato, 9.10.04

*Claude Piron:* “La tiel nomata fiasko de Esperanto”

*Zlatko Tišljarić:* “Kio estas ideologio?”

*Prof. Dr. Heiner Eichner:* “La internacia lingvo kaj la internaciaj institucioj: faktoj kaj problemoj de ilia interrilato”

*Prof. Dr. Vilmos Bencsik:* “Esperanto: klasika kaj avangarda ilo de komunikado”

*Ed Borsboom:* “Problemoj en la biografio *Vivo de Andreo Cseh*”

### **1.3 Pri “Mondbildo en lingvoj” en Litovio**

La 7-an kaj 8-an de Oktobro 2004 en Siauliai/Litovio en ties universitato, okazis inter-nacia lingvistika konferenco "Mondbildo en lingvoj". La konferencon organizis la humanis-ma fakultato de tiu nordlitovia universitato. Ĝi okazis en plenkunsido kaj en kvar sekcioj. En la plenkunsido raporton laŭ temo "Etnolingvistika aspekto de Esperanto" faris la prezidanto de la Senato de la universitato en Siauliai, gvidanto de katedro pri rusa lingvo *prof. habil. dr. Aloyzas Gudavicius*, kiu ankaŭ estas vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio. Entute estis legitaj 49 raportoj de lingvistoj el Estonio, Pollando, Rusio, Litovio, Ukrainio, Latvio. Okaze de la konferenco estis eldonita libro kun resumoj de la faritaj prelegoj - sur paghoj 17-18 estas resumo de la *prelego de prof. Aloyzas Gudavicius*.

Povilas Jegorovas ([litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt), retejo [www.esperanto.lt](http://www.esperanto.lt))

#### **1.4 Pri minoritataj lingvoj en Ĉeboksaro**

La 22-an de oktobro 2004 kadre de aktiveco pri la 9a Lingva Festivalo en Ĉeboksaro, ĉefurbo de rusia subŝtato Ĉuvaŝio, okazis scienc-praktika konferenco "Funkciado de minoritataj lingvoj en kondiĉoj de tutmondiĝo". La konferencon kunorganizis krom diversaj lokaj institucioj ankaŭ la Rusia Esperantista Unio (REU). Inter la laborlingvoj estis Esperanto.

Dekkvar raportoj sonis kadre de la konferenco, la elpaŝintoj kunvenis el kelkaj rusiaj urboj kaj eksterlando. Rezulte de la konferenco aperos libreto kun tekstoj de la elpaŝoj.

La okazigo de la konferenco iĝis ebla dank' al multjara laboro de la Junulara Esperantista Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko, kiu diskonigis Esperanton kaj ligitajn kun ĝi ideojn pere de la ĉiujara Lingva Festivalo. Demandojn pri la pasinta konferenco kaj pri ĝia eventuala okazigo en 2005 sendu rekte al Eduardo Fomin, sekretario de la konferenco: (fomins ĉe [www.chuvsu.ru](http://www.chuvsu.ru))

Mi ĉeestis la konferencon kun raporto pri la lingva situacio en Norda Osetio.

*Slavik V.Ivanov*

#### **1.5 La latina lingvo en Eŭropo**

Internacia Scienca Konferenco pri la temo "Latina lingvo en Eŭropo kun aparta konsidero pri la latina en Kroatio iam kaj nuntempe" okazis en Rijeka-Krk, Kroatio de la 20-a ĝis la 23-a de oktobro 2004. Organizis la konferencon la Universitato de Rijeka, Kultura Asocio Matica Hrvatska kaj ĉefepiskopejo de Rijeka. Du esperantistoj estis inter la prezentistoj de la temo: *Jozo Marevic* kaj *Radenko Milošević*.

La temo de *Milošević* rilatis al Esperanto: "Esperanto sur la postrestaĵoj de la kroata". Kadre de la diskutoj tre favore parolis pri Esperanto vicprezidanto de kroata Akademio de Artoj kaj Sciencoj *Josip Bratulić*.

*Spomenka Stimec*

#### **1.6 14-a Konferenco de GIL en Berlin**

La tradicia jara konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL, Societo pri Interlingvistiko) okazis en Berlin de 5-a ĝis 7-a de novembro 2004. Partoprenis 35 personoj.

Oni prezentis jenajn prelegojn (en la germana):

*Dr. habil. Sabine Fiedler* (Leipzig): „La angla kiel Lingua Franca“

*Prof. Dr. Otto Back* (Wien): „La dua Turo de Babelo“

*Dr. Werner Bormann* (Hamburg): „La sociala fenomeno” (= pri internacia lingvo)

*Prof. Dr. habil. Heiner Eichner* (Wien): „1879 kaj 1887: Volapuko kaj Esperanto en retrospektivo“

*Dr. habil. Cornelia Mannewitz* (Rostock): „Volapuko kaj la sekvoj“

*Dr. rer. medic., Dr. phil. Rudolf Fischer* (Münster): „Esperanto kaj Novial: Kiujn kriteriojn por ideala planlingvo plenumas ĉiufoje nur unu de ili?“

*Oxana Bourkina* (St. Petersburg): „Pri la evoluo de Esperanto sub fonologia aspekto“

*Dr. Dirk Willkommen* (Neumünster): „Lingvoplanado en germanaj lingvoj (ortografio)“

*Birte Arendt* (Greifswald): „La politiko de la federacia lando Meklenburgio-Antaŭpomerio pri la platgermana sub la signo de la eŭropa ĉarto pri lingvoj“

*Dr. habil. Cornelia Mannewitz* (Rostock): „Informoj pri la libro de Aleksandr S. Mel’nikov: Lingvokult’urologičeskie aspekty planovykh meždunarodnykh jazykov (na fone etniĉeskikh jazykov). Rostov-na-Dona: Izdatel’stvo Rostovskogo gosudarstvennogo pedagogičeskogo universiteta, 2004, 632 p. (Lingvokulturologiaj aspektoj de internaciaj planlingvoj – sur la fono de etnaj lingvoj)“

*Prof. Dr. Heiner Eichner* (Wien): „Informoj pri la lingvo-projekto KOD“

La aktoj de la konferenco aperos en 2005.

Pri la ĝis nun aperintaj 11 volumoj de konferencaktoj de GIL informas

[www.interlinguistik-gil.de/beihefte.html](http://www.interlinguistik-gil.de/beihefte.html).

## **1.7 Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST)**

Kompare al beletro en Esperanto bedaŭrinde ne multas scienc-aplika faka literaturo, kvankam ĝuste ĝi estus ege bezonata. Konsciaj pri tiu grava manko la du esperantistaj asocioj de la siatempa Ĉeĥoslovakio (la ĉeĥa kaj la slovaka) alterne aranĝis serion da seminarioj (fakte temis pri simpozioj!) kun la nomo "[Seminario] Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" ([S]AEST). Okazis entute 7 tiaj aranĝoj, eksterlande bedaŭrinde ne sufiĉe konataj (1978 Žilina, 1980 Ústí nad Labem, 1981 Žilina, 1982 Ĉeske Budejovice, 1984 Brno, 1988 Poprad, 1989 Stražnice), kun ĉefe 50 - 70 partoprenantoj, foje tamen kun pli ol 100. Ĉiu aranĝo havis kadran temon el la vasta gamo de scienco kaj tekniko; kaj en aparta sekcio ĝi okupiĝis pri ĝeneralaj kaj specifaj demandoj de terminologio en Esperanto. Inter la traktitaj temoj ekz. estis *raciigo, transporto, nutraĵproduktado, energio, komputiloj, vivmedio* ktp. La prelegoj ne

nur klerigis la aŭskultantojn sed ankaŭ montris aplikon de la koncerna faka terminologio. La aranĝoj estis bone organizitaj kaj vere altnivelaj, kaj la organizintoj eĉ sukcesis eldoni ĉiujn prelegojn en formo de modeste produktitaj aktoj, kiuj formas ankoraŭ nun bonegan fakaplikan kaj terminologi-rilatan materialon. Tiun gravan tradicion de la SAEST-serio kun precize la samaj celoj post 1989, ekde la jaro 1998 ĉiun duan jaron, daŭrigas la profesia kongresa agentejo kaj eldonejo KAVA-PECH, sub la sperta gvido de *d-ro Petr Chrdle*, tamen kun eta kaj plene pravigita nomŝanĝo: "Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" (KAEST). Ĝis nun okazis tri modele organizitaj KAEST-oj kun la ĉefaj kadraj temoj "Modernaj rimedoj de komunikado" (Prago 1998), "Ekonomio" (Prago 2000) kaj "Elektronikaj rimedoj" (Dobřichovice/Praha 2002).

Ne mankis ankaŭ aliaj temoj kaj, kompreneble, sekcio, kiu aparte traktis problemojn de terminologio. Aparte substrekendas, ke KAVA-PECH eldonis bonkvalite redaktitajn kaj presitajn prelegarojn, kiuj estas inkluzivitaj en la konferenc-kotizo, do sendita al ĉiu partopreninto. Ĉi-tiuj libroj ankoraŭ estas aĉeteblaj ([info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz), rigardu ankaŭ [www.kava-pech.cz/kaest](http://www.kava-pech.cz/kaest)). La prezoj de KAEST-oj estas moderaj, kaj la teknikaj kondiĉoj (prelegejo, teknikiloj, manĝoj kaj tranoktejoj) estas bonaj.

La 4-a KAEST okazis de la 12-a ĝis 14-a de novembro 2004, denove en Dobřichovice, kun iom vastaj temkompleksoj: "Fake pri Esperanto kaj Esperante pri sciencoj":

Oni prezentis jenajn prelegojn (laŭ la vico de la prezento, klarigetoj enkrampe - Red.):

*Dr. Detlev Blanke* (DE): "Kio estas faklingvo?"

*Dr. Heinz Hoffmann* (DE): "Problemo de 'nespecifa' speco (termino kaj sistemo de fervoj-faka nocio)

*Wera Blanke* (DE): "Pri terminoj el la Vikipedio – ekzemploj el la teatra fako"

*Marc Bavant* (FR) : "Apliko de XML al fakaj laboroj pri Esperanto"

*Martin Minnich* (SK): "[Esperanto@Interreto](mailto:Esperanto@Interreto)"

*Prof. Dr. Ottó Haszpra* (HU): "La lingvaj kostoj en Eŭropa Unio"

*Miroslav Malovec* (CZ): "La Enciklopedio de Esperanto" (en elektronika formo)

*Jan Werner* (CZ): "Planlingvo" (kaj kion signifas/signifu 'planiteco' en Esperanto)

*Prof. Dr. Rüdiger Sachs* (DE): "Parazitismo kaj parazitologio"

*Boĵidar Leonov (BG): “Evoluo de la internacia kaj ekologia turismo en Eŭropo”*

*Josef Hron (CZ): Ebloj por la elektronika prilaborado de la grandaj tradukaj vortaroj de Esperanto”*

La prelegoj aperos libroforme. KAEST 5 estas planita por 2006 kaj eventuale traktos la temon “Lingvoj kaj fakoj en la reto”.

## **2 Aranĝoj estontaj**

### **2.1 Esperantologia konferenco en Vilno – por junaj esploristoj**

Estas fakto, ke jen kaj jen aperas junaj talentaj esperantistoj kun universitata klero, eĉ kun doktoreco, kiuj verkis interesajn esperantologiajn studojn, prezentis magistrigajn aŭ doktorigajn disertaciojn aŭ intencas tion fari, kaj tamen restas relative nekonataj.

La bedaŭrinde nesufiĉa intereso en la movado por tia scienca agado ofte sekvigas certan frustron aŭ eĉ malaperon de tiuj talentuloj. Sed ni bezonas ĉiun talentulon, ne nur en la sferoj de faka apliko, beletro ktp., sed ankaŭ aparte en la sferoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Ja restas ankoraŭ multo por esplori pri internacia lingva komunikado, pri planlingvoj kaj - aparte - pri Esperanto kun sia komunumo, por havi pli bonan science bazitan fundamenton por niaj klopodoj kaj argumentoj.

Pro tio la tradicia esperantologia konferenco, okazonta kadre de la UK 2005 en Vilno, ĉi-foje ne rilatiĝos al iu konkreta temo, sed estu loko aparte por junaj esperantologoj. Ili prezentu siajn studo-finajn disertaciojn, diskutigu siajn aperintajn aŭ aperontajn verkojn aŭ informu pri temoj, pri kiuj ili estas laborantaj aŭ pri sciencorganizaj aspektoj de siaj esperantologiaj agadoj.

Krom tio la konferenco diskutu, kion ŝanĝi, por ke junaj intelektuloj, provizitaj per diversfakaj modernaj scioj, sin sentu pli forte ol ĝis nun motivitaj verki science pri Esperanto. Estas planite eldoni la aktojn de la konferenco. La Estraro de CED, kiu aŭspicias la konferencon, elektos la plej bonan por eventuala aperigo en la socilingvistika revuo "Language Problems & Language Planning".



En kazo de neceso oni klopodos trovi eblecon finance subvencii la partoprenon de taŭgaj kandidatoj. Interesatoj sin anoncu ĉe d-ro Detlev Blanke ([dblanke.gil@snaflu.de](mailto:dblanke.gil@snaflu.de)).

## 2.2 15-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko 2005 en Berlin

La kutima jara konferenco de la germana Gesellschaft für Interlinguistik e.V. GIL (Societo pri Interlingvistiko) en la jaro 2005 okazos en Berlin de 28-a ĝis 30-a de oktobro. Ĝi estos la 15-a faka konferenco de tiu ĉi organizo kaj traktos la kadran temon “Disvastigo-politiko de etnolingvoj kaj planlingvoj”. La konferenco, kiel kutime, estos germanlingva. Interesatoj sin direktu al la redaktoro ([dblanke.gil@snaflu.de](mailto:dblanke.gil@snaflu.de)).

## 3 Publikigaĵoj pri Volapuko kaj ĝia kreinto

Lastjare, en 2004, pasis 125 jaroj post la publikigo de Volapuko (1879/80). Pro tio ni publikigas liston de aĉeteblaj titoloj pri Volapuko kaj pri ties inventinto, prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912). La liston pretigis Edition Iltis (gvidantino : Irmi Haupenthal)

HARTMANN, Katharina; HARTMANN, Elisabeth; HAUCK, Aloisia: *Denkwürdiges aus dem Leben und Wirken unseres geistlichen Herrn Veters und Onkels Prälat Johann Martin Schleyer*. Mit einem Nachwort von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Konstanz 1898.), 15 p. Saarbrücken: Edition Iltis 1997., 3,90 €

HAUPENTHAL, Reinhard: *Der erste Volapük-Kongreß. Friedrichshafen, August 1884. Dokumente und Kommentare*. Saarbrücken: Iltis 1984. 118 p., 18,00 €

HAUPENTHAL, Reinhard: *Johann Martin Schleyer (1831-1912). Pfarrer von Litzelstetten (1875-1885)*. Vortrag 29. Juni 2002 in Litzelstetten. (2., korr. Aufl.) (Schliengen): Edition Iltis 2004. 27 p., ISBN 3-932807-32-4, 4,50 €

HAUPENTHAL, Reinhard: *La Unuaj Libroj de Schleyer (1880) kaj de Zamenhof (1887). Pri la lanĉo de du plan-lingvoj*. (Schliengen): Edition Iltis 2000. 20 p., 3,00 €

HAUPENTHAL, Reinhard: *Prof. Dr. Siegfried Lederer (1861-1911) und die Volapük-Zeitschrift „Rund um die Welt“ (1888/89-1891/92)*. (Schliengen): Edition Iltis 2001. 15 p. ISBN 3-932807-18-9, 3,90 €

JONG, Arie de: *Leerboek der wereldtaal*. Voorburg: Repko 1932. 54 p., 10,00 €

JONG, Arie de: *Aperçu de la Volapük*. Gams: Sprenger [1950]. 6 p., 3,00 €

JONG, Arie de: *Kurze Volapük-Grammatik* (Wienacht): Sprenger 1929. 12 p., 2,70 €

- JONG, Arie de: *Short grammar of Volapük*. Gams: Sprenger [1950]. 6 p., 3,00 €
- KNIELE, Rupert: *Weltsprache-Kalender für das Jahr 1886*. Mit einem Nachwort von Reinhard Haupenthal. (Repr. de la 1<sup>re</sup> ed. Konstanz 1886.) Saarbrücken: Iltis 1986. 66 p. 10,00 €
- KNIELE, Rupert: *Das erste Jahrzehnt der Weltsprache Volapük*. Anmerkungen, Nachwort, Schrifttumsverzeichnis und Personenindex von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Überlingen 1889.) Saarbrücken: Iltis 1989. 167 p., 21,00 €
- KRÜGER, F. J.: *Compendio del Volapük*. Gams: Sprenger 1950. 6 p., 3,00 €
- KRÜGER, F. J.: *English-Volapük List of 3000 most frequent words*. Gams: Sprenger 1950. 51 p., 6,-- €
- KRÜGER, Johann: *Kortfattad Volapük-grammatik*. Amsterdam: Societas Polyglottica Universalis 1950. 7 p., 1,50 €
- LEDERER, Siegfried: *Das Problem einer künstlichen Weltverkehrssprache*. Vortrag aus dem Jahre 1899. Mit einem Nachwort von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Prag 1899.) (Schliengen): Edition Iltis 2004. 10 p. 4°. ISBN 3-932807-46-4, 4,50 €
- PINTH, Jean-Baptiste: *Kleine Grammatik der Schleyerschen Weltsprache Volapük*. Mit einem Nachwort von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Konstanz 1900.) Saarbrücken: Iltis 1983. 12 p., 3,00 €
- SCHLEYER, Johann Martin: *Volapük. Die Weltsprache. Entwurf einer Universalsprache für alle Gebildete der ganzen Erde*. (Nachdr. d. Ausg. Sigmaringen 1880.) – Beigeb. ist: Reinhard Haupenthal: *Volapük-Bibliographie*. Hildesheim, Zürich, New York: Olms 1982. XII, 136; VI, 124 p., 24,80 €
- SCHLEYER, Johann Martin: *Über die Pfuschersprache des Pseudo-Esperanto*. (Nachdr. d. Ausg. Konstanz 1900.) Mit einem Nachwort von Reinhard Haupenthal. (Schliengen): Edition Iltis 2001. 10 p. ISBN 3-932807-19-7, 3,00 €
- SCHLEYER, Johann Martin: *Vereinfachung und Erleichterung der musikalischen Notenschreibung. Ein Vorschlag*. (Nachdr. d. Ausg. Konstanz 1902.) Mit einem Nachwort von Nikolaus Breyer. (Schliengen): Edition Iltis 2002. 24 p. 4°. ISBN 3-932807-29-4, 7,50 €
- SCHMIDT, Johann: *Lehrbuch der Weltsprache Volapük*. Frankfurt/M.: Bröner 1933. 36 p. 9,00 €
- SCHMIDT, Johann: *Jenotem valemäpüka Volapüka*. Geschichte der Universalsprache Volapük. Voorburg: Repko 1964. 35 p., 6,00 €
- SLEUMER, Albert: *Johann Martin Schleyer (18. Juli 1831 – 16. August 1912). Ein Lebensbild*. Mit einem Nachwort von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Klagenfurt 1914.) Saarbrücken: Iltis 1981. 37 p., 5,00 €
- Statuds e nomem konömik ela ‚Volapükakluba valemik nedänik‘*. Voorburg: Repko 1934. 10 p., 3,00 €

*Volapük-Litteratur*. Mit einem bibliographischen Nachtrag von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Frankfurt/M. 1888.) Saarbrücken: Iltis 1983. 10 p., 3,00 €

ZAMPONI, Ludwig: *Zur Frage der Einführung einer internationalen Verkehrssprache*. (Nachdr. d. Ausg. Graz 1904.) Mit einem Nachwort von Reinhard Haupenthal.) (Schliengen): Edition Iltis 2002. 72 p. ISBN 3-932807, 9,00 €

*Jveizapot. Schweizerische Weltsprachezeitung*. Organ für die schweizerischen Volapükisten und des Zentralvorstandes. Reprint d. Ausg. Zürich 1890-1891. Saarbrücken: Edition Iltis 1998. 36 p. 4°. ISBN 3-932807, 14,00 €

*Rund um die Welt. Zeitschriften für Volapükisten und solche, die es werden wollen. 1.-4. Jahrgang April 1888 bis inclusive März 1892*. Mit einem Nachwort zum Neudruck hg. von Reinhard Haupenthal. (Nachdr. d. Ausg. Berlin 1888 bis 1892.) Hildesheim, Zürich, New York: Olms 2000. 764, 13\* p., 178,00 €

*Volapükabled*. Faka revuo pri volapükologio. Saarbrücken: Iltis 1 (1985) – 3 (1987): Nr. 1-4. 88 S. Fortsetzung/daŭrigo: *Volapük-Studoj*. Faka revuo por Volapükologio. Saarbrücken: Iltis 1990. Heft 1, 28 p., 20,00 €

La eldonaĵoj estas riceveblaj ĉe UEA kaj ĉe la eldonisto: Edition Iltis, B.P. 19 F-84340 Malaucene, Tel./Fax: +33 (0)4 90 65 28 33, [Editioniltis@aol.com](mailto:Editioniltis@aol.com)

## **4 El la universitata medio**

### **4.1 Interlingvistikaj aranĝoj en Poznań**

En Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznań (Pollando) nuntempe okazas du interlingvistikaj aranĝoj:

a) Ekde la somera semestro 2002 *prof. d-ino Alicja Sakaguchi* okazigas nedevigan kurson por studentoj de aplikata lingvistiko en Katedra Glottodydaktyki i Translatoryki (Instituto pri Lingvodidaktiko kaj Tradukado) [a.sakaguchi@gmx.de](mailto:a.sakaguchi@gmx.de).

b) Ekde la akademia jaro 1997/98 *d-ino Ilona Koutny* okazigas kurso-serion sub la nomo „Interlingvistikaj Studoj”. Ĝi estas organizata por personoj el Pollando kaj eksterlando, kiuj regas Esperanton. Ĝi estas instalita laŭ permeso de la universitata rektoro kaj subordigita al la dekanato de la Novfilologia Fakultato.

Pri la lasta stato:

Post bazaj studoj pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, internacia kaj interkultura komunikado, planlingvistiko, esperantaj kulturo, gramatiko, literaturo kaj movadhistorio, la 3a jaro de Interlingvistikaj Studoj ĉifoje estis dediĉita al lingvopedagogio enkadre de la specialiĝo. La

aŭtuna sesio de la kvina semestro okazis inter 25.09-01.10.2004 kun la kontribuo de *Istvan Ertl* kiu donis vastan bildon pri la nuntempa e-literaturo.

La gestudentoj povis konatiĝi kun la teorio de lingvoinstruado kaj praktike spertiĝi pri esperanta metodiko dank' al la dinamikaj lecionoj de la vojaĝanta metodikistino, *d-rino Katalin Kovats* kaj al la krakova metodikistino *Maria Majerczak*, estrino de la Pola ILEI-sekcio. (Informojn donas Dr. Ilona Koutny [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl). Vidu ankaŭ <http://main.amu.edu.pl/~interl/index.html>).

## 4.2 Kursaro de Wim Jansen en la Universitato de Amsterdam

Kiel konate en la Universitato de Amsterdam la Katedron Interlingvistiko/Esperanto gvidas docento *Wim Jansen*. Li ellaboris ampleksan kursmaterialon por studentoj, kies enhavtabelon ni sube publikigas. La enhavo kaj la strukturigo de la materialo certe donos impulsojn ankaŭ al aliaj prelegantoj kaj lekciistoj pri interlingvistiko:

*Jansen, Wim (2004): Elementen uit de interlinguïstiek. Syllabus bij het college Interlinguïstiek. Amsterdam: Universiteit van Amsterdam, Faculteit der Geesteswetenschappen, 290 p.*

### Inhoudsopgave *Enhavtabelo*

<b>1</b>	<b>Taalverscheidenheid, taaldominantie en internationale communicatie</b>	<b>1</b>
	<i>Lingva diverseco, lingva superrego kaj internacia komunikado</i>	
1.1	De veeltaligheid in de wereld <i>La multlingveco en la mondo</i>	2
1.2	Internationale communicatie <i>Internacia komunikado</i>	5
1.3	De expansie van sommige talen <i>La disvastiĝo de kelkaj lingvoj</i>	6
1.4	De Europese Unie <i>Eŭropa Unio</i>	8
1.5	Aspecten van veeltaligheid in de internationale communicatie <i>Aspektoj de multlingveco en la internacia komunikado</i>	13
<b>2</b>	<b>Inleiding in de interlinguïstiek <i>Enkonduko en la interlingvistikon</i></b>	<b>19</b>
2.1	Linguïstiek en interlinguïstiek <i>Lingvistiko kaj interlingvistiko</i>	19
2.2	Interlinguïstiek <i>Interlingvistiko</i>	21
2.3	De plaats van de interlinguïstiek <i>Lokdifino de la interlingvistiko</i>	23
2.4	Kunsttalen of plantalen <i>Artefaritaj lingvoj aŭ planlingvoj</i>	25
2.5	Eenvoud als kenmerk van plantalen <i>La simpleco kiel propraĵo de planlingvoj</i>	30
2.6	De volwaardigheid van plantalen <i>La plenvaloro de planlingvoj</i>	31
2.7	Interlinguïstiek en esperantologie <i>Interlingvistiko kaj esperantologio</i>	34
2.8	De wetenschappelijke waarde van plantalen <i>La scienca valoro de planlingvoj</i>	35

<b>3</b>	<b>Fragmenten uit de plantaalhistorie (I)</b>	
	<i>Fragmentoj el la historio de la planlingvoj (I)</i>	<b>39</b>
3.1	Historische en thematische inleiding <i>Historia kaj laŭtema enkonduko</i>	39
3.2	Britse projecten uit de zeventiende eeuw <i>Britaj 17-jarcentaj projektoj</i>	43
3.3	Muziek als universele taal <i>La muziko kiel internacia lingvo</i>	53
3.4	Moderne plantalen <i>Modernaj planlingvoj</i>	54
<b>4</b>	<b>Fragmenten uit de plantaalhistorie (II)</b>	
	<i>Fragmentoj el la historio de la planlingvoj (II)</i>	<b>59</b>
4.1	Volapük — een korte historie <i>Volapük — mallonga historio</i>	59
4.2	Volapük — een taalschets <i>Volapük — lingvoskizo</i>	63
4.3	Volapük — een conclusie <i>Volapük — konkludo</i>	65
4.4	Esperanto — de auteur <i>Esperanto — la aŭtoro</i>	66
4.5	De eerste Esperanto-brochure <i>La unua Esperanto-broŝuro</i>	68
4.6	De minimale Esperanto-grammatica <i>La minimuma E-gramatiko</i>	70
4.7	Esperanto — de verbreiding tot 1900 <i>La E-disvastiĝo ĝis 1900</i>	71
<b>5</b>	<b>Drie moderne plantalen <i>Tri modernaj planlingvoj</i></b>	<b>77</b>
5.1	Het congres van Boulogne <i>La Bulonja kongreso</i>	77
5.2	De Verklaring van Boulogne <i>La Bulonja Deklaracio</i>	79
5.3	Het <i>Fundamento de Esperanto</i> <i>La Fundamento de Esperanto</i>	81
5.4	Het Ido-schisma <i>La Ido-skismo</i>	83
5.5	Het Ido nu <i>Ido nuntempe</i>	86
5.6	Interlingua <i>Interlingua</i>	88
5.7	Interlingua tegenover Esperanto/Ido <i>Interlingua kompare kun Esperanto/Ido</i>	91
5.8	Het Interlingua nu <i>Interlingua nuntempe</i>	93
<b>6</b>	<b>Typologie van drie moderne plantalen</b>	
	<i>Tipologio de tri modernaj planlingvoj</i>	<b>97</b>
6.1	Esperanto <i>Esperanto</i>	97
6.2	Ido <i>Ido</i>	104
6.3	Interlingua <i>Interlingua</i>	110
6.4	Specimenteksten <i>Specimenaj tekstoj</i>	114
<b>7</b>	<b>Enkele structurele opties binnen een plantaal</b>	
	<i>Kelkaj strukturaj elektelecoj ene de planlingvoj</i>	<b>117</b>
7.1	Het alfabet <i>La alfabeto</i>	118
7.2	De accusatief <i>La akuzativo</i>	122
7.3	De meervoudsconcordantie <i>La pluralkongruo</i>	126
7.4	Pseudo-suffigering <i>Pseŭdosufiksado</i>	127
7.5	Transitiviteit <i>Transitiveco</i>	129
7.6	Semantiek en lexicon <i>Semantiko kaj leksiko</i>	130
7.7	Lexicon: aardrijkskundige namen <i>Leksiko: geografiaj nomoj</i>	132
7.8	Schematiciteit en natuurlijkheid <i>Skemeco kaj natureco</i>	135
<b>8</b>	<b>De Esperanto-beweging tot de Tweede Wereldoorlog</b>	
	<i>La Esperanto-movado ĝis la Dua Mondmilito</i>	<b>141</b>
8.1	Het gezag van Zamenhof <i>La aŭtoritato de Zamenhof</i>	141
8.2	De evolutie van de taal <i>La evoluo de la lingvo</i>	142

8.3	De evolutie van de sprekersgemeenschap <i>La evoluo de la Esperanto-parolantaro</i>	143
8.4	De Volkenbond <i>Ligo de Nacioj</i>	146
8.5	De arbeidersbeweging <i>La laborista movado</i>	148
8.6	Op weg naar de Tweede Wereldoorlog <i>Survoje al la Dua Mondmilito</i>	151
8.7	Een nawoord over het idealisme in het interbellum <i>Postparolo pri la intermilita idealismo</i>	152
<b>9</b>	<b>De Esperanto-beweging na de Tweede Wereldoorlog</b>	
	<b><i>La Esperanto-movado post la Dua Mondmilito</i></b>	<b>155</b>
9.1	Het herstel na de Tweede Wereldoorlog <i>La restariĝo post la Dua Mondmilito</i>	156
9.2	Het zoeken naar erkenning en prestige <i>La serĉado de rekono kaj prestiĝo</i>	157
9.3	Unesco <i>Unesko</i>	158
9.4	De protestgeneratie <i>La protestgeneracio</i>	162
9.5	De pragmatische generatie <i>La pragmata generacio</i>	163
9.6	Naar het einde van de Koude Oorlog <i>Al la fino de la Frida Milito</i>	164
9.7	Globalization ofwel mondialisering <i>'Globalization' aŭ tutmondigo</i>	165
9.8	Esperanto-allerlei: feiten en statistieken <i>Diversaĵoj pri Esperanto: faktoj kaj statistikoj</i>	167
<b>10</b>	<b>Aspecten van taalplanning in het Baskisch</b>	
	<b><i>Aspektoj de lingvoplanado en la eŭska lingvo</i></b>	<b>179</b>
10.1	Overzicht van het Baskisch <i>Superrigardo de la eŭska lingvo</i>	179
10.2	Baskische taal of Baskische dialecten? <i>Ĉu eŭska lingvo aŭ eŭskaj dialektoj?</i>	181
10.3	Taal en schrijftaal <i>Lingvo kaj skriblingvo</i>	182
10.4	Modificaties aan de taal <i>Lingvaj modifoj</i>	187
10.5	De parallel met het Esperanto <i>Paralelaĵoj kun Esperanto</i>	192
<b>11</b>	<b>Weerstanden tegen kunsttalen <i>Rezistoj kontraŭ planlingvoj</i></b>	<b>195</b>
11.1	Esperanto: een onbekende realiteit <i>Esperanto: nekonata realaĵo</i>	196
11.2	Vervolgingen <i>Persekutoj</i>	197
11.3	Informatie of desinformatie? <i>Ĉu informado aŭ misinformado?</i>	201
11.4	Verdringing <i>Forpuŝado</i>	202
11.5	Projectie <i>Projekciado</i>	203
11.6	Rationaliseren <i>Raciigado</i>	204
11.7	Isoleren <i>Izolado</i>	205
11.8	Nabeschouwing <i>Postparolo</i>	207
<b>12</b>	<b>Esperanto als literaire taal? <i>Ĉu Esperanto estas literatura lingvo?</i></b>	<b>213</b>
12.1	Taal en literatuur <i>Lingvo kaj literaturo</i>	213
12.2	Vertaalde literatuur <i>Tradukita literaturo</i>	214
12.3	Originele literatuur <i>Originala literaturo</i>	215
12.4	PEN International <i>PEN Internacia</i>	218
12.5	Tekstbesprekingen <i>Tekst-diskutoj</i>	219
12.6	Slotbeschouwing <i>Konkludaj rimarkoj</i>	232

<b>13</b>	<b>Hoe blijft het Esperanto bij de tijd? Kiel Esperanto restas ĝisdata?</b>	<b>235</b>
13.1	Taalverandering <i>Lingvaj ŝanĝoj</i>	236
13.2	Polysemie <i>Polisemio</i>	237
13.3	Neologismen <i>Neologismoj</i>	237
13.4	Vertalen met of zonder neologismen <i>Traduki kun aŭ sen neologismoj</i>	241
13.5	Interferentie <i>Interferoj</i>	243
13.6	De strijd over de neologismen <i>La diskuto pri neologismoj</i>	246
13.7	Wie werkt er aan de groei van de inventaris? <i>Kiuj kultivas la kreskigon de la vortinventaro?</i>	246
<b>14</b>	<b>Een toekomstscenario voor het Esperanto</b>	
	<i>Ebla scenaro por la estonteco de Esperanto</i>	<b>251</b>
14.1	Een paar willekeurige scenario's <i>Iuj arbitre elektitaj scenaroj</i>	252
14.2	De maatschappelijke relevantie van het Esperanto <i>La socia graveco de Esperanto</i>	254
14.3	De Europese Unie <i>Eŭropa Unio</i>	260
14.4	De ecologie <i>La ekologio</i>	264
14.5	Conclusies <i>Konkludoj</i>	266
	<b>Kennisbronnen van de interlinguïstiek <i>Interlingvistikaj sci-fontoj</i></b>	<b>271</b>
	<b>Bibliografie <i>Bibliografio</i></b>	<b>277</b>

Krome en la libro enestas 20 grafikaĵoj kaj 44 tabeloj.

Por kontaktoj: Wim Jansen, [wimjansen@casema.nl](mailto:wimjansen@casema.nl)

### 4.3 Studofinaj disertacioj

Tempczyk, Katarzyna (2004): *Historia i działalność esperanckiego ruchu ekumenicznego. Studium historyczno - teologiczne*. (Historio kaj agado de esperantista ekumena movado. Studiumo historia – teologia). Warszawa: Uniwersytet Kard. Stefana Wyszyńskiego w Warszawie, Wydział Teologiczny, 176 + 11 p., magistra disertaĵo

ĉefaj ĉapitroj:

1. Ecoj de la lingvo Esperanto kaj de la esperantista movado favoraj al ekesto kaj funkciado de esperantista ekumena movado
2. Komenco de kristanaj E-movadoj (1887-1914)
3. Kristanaj E-organizaĵoj en la jaroj 1914-1945
4. Ekumenaj E-organizaĵoj post la dua mondmilito
5. Radikiĝo de la katolika E-movado en la Eklezio

Čižikaitė, Aida (2004): *Sangražiniai veiksmažodžiai lietuvių, Esperanto ir ksj kuriose romanų kalbose* (Refleksivaj verboj en la litova, Esperanto kaj kelkaj romanaj lingvoj). Kaunas: Humanisma Fakultato de Vilniaus universitato, Katedro de litova filologio.122p.

(En la verko estas analizataj refleksivaj verboj en la litova, latina, itala, hispana, portugala kaj en Esperanto. La verko havas resumojn en la litova, itala kaj en Esperanto. Ĝi estas la unua magistra verko ligita al Esperanto en Litovio. Aida Čižikaitė lektoras pri Esperanto en tiu-ĉi fakultato).

Moerman, Els (2003-2004): *De promotie van het Esperanto als universele tweede taal* (La propono de Esperanto kiel universalan duan lingvon). Literatuurstudie. Leuven: Katholieke Universiteit Leuven. Faculteit sociale wetenschappen. Departmant communicatiewetenschap, 132 p. , magistra (licencia) disertacio

Treder, Julia (2004): *Esperanto in Halle. Die Geschichte der Plansprache im Kontext der gesellschaftlichen und politischen Entwicklung*. Halle-Wittenberg: Martin-Luther-Universität, Allgemeine Sprachwissenschaft, 113 p., magistra disertacio (pri la historio de Esperanto en la saksa urbo Halle, bone dokumentita)

#### 4.4 Doktoriga disertacio pri la instruado de Esperanto

Bujdosó Iván (2004): *Az eszperantó mint tervezett nyelv oktatása* (Instruado de la planita lingvo Esperanto). Budapest: Universitato ELTE, 179 p.

Ni donas detalan rigardon en la enhavon de la doktoriga disertacio el Budapeŝto, ĉar ĝi certe estas interesa por lingvo-instruantoj kaj metodikistoj :

##### Tartalom / Enhavo

1	AZ ESZPERANTÓ MINT NYELVI JELENSÉG / LA LINGVA FENOMENO ESPERANTO.....	1
1.1	MIÉRT TERVEZNEK AZ EMBEREK EGY NYELVET? / KIAL ONI PLANAS LINGVON?.....	1
1.1.1	Társadalmi okok / Sociaj kaŭzoj .....	1
1.1.2	A nyelvtervezők egyéni okai / Individuaj kaŭzoj de lingvoplanantoj.....	1
1.2	A TERVEZETT NYELV ÉS AZ EGYNYELVŰ ANYANYELVI BESZÉLŐ / LA PLANITA LINGVO KAJ LA UNULINGVA DENASKLINGVA PAROLANTO .....	2
1.2.1	Hogyan születik egy új nyelv? / Kiel naskiĝas nova lingvo?.....	2
1.2.2	Hogyan születik újjá egy nyelv? Kiel renaskiĝas lingvo?.....	3
1.3	A NYELVI PROBLÉMA MEGOLDÁSI LEHETŐSÉGEI / EBLECOJ POR SOLVI LINGVAJN PROBLEMOJN .....	3
1.4	A GÉPI FORDÍTÁS / MAŜINA TRADUKADO.....	3
1.5	TERVEZZÜNK NYELVET / NI PLANU LINGVON .....	4
1.5.1	Állítás és tagadás / Konstato kaj neado .....	4
1.5.2	A személyes névmások / Personaj pronomoj .....	5
1.5.3	Kérdezés / Demandado .....	5
1.5.4	Az igeragozás / Konjugacio de verbo.....	5
1.5.5	A nyelvi kategoriák jelölése / Signado de lingvaj kategorioj.....	6
1.5.6	A tabellaszavak / La tabelvortoj .....	6
1.5.7	A fonetika / La fonetiko .....	6
1.5.8	A szóképzés /La vortfarado .....	7
1.5.9	A képzett szó könnyebben tanulható / La derivata vorto estas pli facile lernebla .....	8
1.6	AZ ESZPERANTÓ NYELVÉSZETI JELLEMZÉSE / LINGVISTIKA KARAKTERIZADO DE ESPERANTO .....	8
1.7	AZ ESZPERANTÓ OKTATÁSÁVAL KAPCSOLATOS HIPOTÉZISEK / HIPOTEZOJ PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO.....	11
1.7.1	Könnyűség / Facileco .....	11
1.7.2	Közel anyanyelvi szintű elsajátíthatóság / Eblo lerni ĝin ĝis preskaŭ denasklingva nivele .....	11
1.7.3	Az eszperantót mindenki megtanulhatja / Ĉiu povas ellerni ĝin.....	11



1.7.4	Az eszperantó kommunikációs használhatósága / Komunika uzeblo de Esperanto ....	11
1.7.5	A nyelvtudás pozitív hatásai / Pozitivaj efikoj de lingvoscio.....	11
1.8	AZ ESZPERANTÓ OKTATÁSÁVAL KAPCSOLATOS KÉRDÉSEK / TRAKTADO PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO .....	12
1.8.1	Az eszperantó tanulhatósága / La lernebleco de Esperanto.....	12
1.9	AZ ESZPERANTÓ OKTATÁSA A VILÁGBAN / INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA MONDO .....	13
1.10	AZ ESZPERANTÓ OKTATÁSA MAGYARORSZÁGON / INSTRUADO DE ESPERANTO EN HUNGARIO .....	14
1.11	AZ ESZPERANTÓ OKTATÁSÁNAK INTÉZMÉNYEI / INSTITUCIOJ PRI INSTRUADO DE ESPERANTO .....	14
1.11.1	ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) .....	14
1.11.2	IEI (Internacia Esperanto Instituto).....	15
1.11.3	ELTE, Eszperantó szak / Esperanto-fako en ELTE .....	15
1.11.4	AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj).....	15
1.11.5	ESF (Esperantic Studies Foundation) / Fondaĵo por Esperantologiaj Studoj.....	15
1.12	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO .....	16
2	EURÓPA NYELVI PROBLÉMÁI / LINGVAJ PROBLEMOJ EN EŬROPO .....	17
2.1	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO .....	19
3	AZ ESZPERANTÓ PROPEDEUTIKAI ÉRTÉKE / PROPEDEŬTIKA VALORO DE ESPERANTO .....	21
3.1	A PADERBORNI MODELL / LA PADERNBORNA MODELO .....	21
3.2	EKPAROLI: ESZPERANTÓ OKTATÁSI PROJEKT / EKPAROLI: PROJEKTO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO .....	22
3.3	A TALENTO ISKOLA / LA LERNEJO TALENTO .....	27
3.3.1	Nevelj zsenit! / Eduku genion! .....	27
3.3.2	Az alapítvány célkitűzései / Celoj de la fondaĵo .....	30
3.3.3	A budaörsi kísérlet / La eksperimento en Budaörs.....	31
3.3.4	Az eszperantó oktatása / La instruado de Esperanto .....	32
3.4	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO .....	33
4	A NYELVTANÍTÁSI MÓDSZEREK ÉS TÖRTÉNETŬK / LINGVOINSTRUAJ METODOJ KAJ ILIA HISTORIO .....	35
4.1	BEVEZETÉS / ENKONDUKO.....	35
4.2	AZ ÓKORTÓL A XIX. SZÁZAD ELEJÉIG / DE LA PRAEPOKO ĜIS LA KOMENCO DE LA 19-A JARCENTO .....	35
4.2.1	A görögök és a rómaiak / La grekoj kaj la romianoj.....	35
4.2.2	A középkori nyelvtanítás / Lingvoinstruado en la mezepoko .....	35
4.2.3	Nyelvtanítás az újkor kezdetén / Lingvoinstruado en la komenco de la nova epoko...	36
4.2.4	A történelmi módszerek jellemzése / Karakterizado de la tradiciaj metodoj .....	36
4.3	A XIX. SZÁZAD ELEJÉTÓL A XX. SZÁZAD KÖZEPÉIG / DE LA KOMENCO DE 19-A JARCENTO ĜIS LA MEZO DE LA 20-A JARCENTO.....	36
4.3.1	A nyelvtani-fordító módszert / La traduka-gramatika metodo.....	37
4.3.2	A direkt módszer / La rekta metodo .....	37
4.3.3	Közbenső módszerek / Meza metodo.....	38
4.3.4	A módszerek jellemzése / Karakterizado de la metodoj .....	39
4.4	A XX. SZÁZAD KÖZEPÉTÓL A XX. SZÁZAD VÉGÉIG / DE LA MEZO DE LA 20-A JARCENTO ĜIS LA FINO DE LA 20-A JARCENTO .....	39
4.4.1	A szociális tanuláselmélet / Teorio de socia lernado.....	39
4.4.2	Az audiolingvális módszer / La aŭdlingva metodo .....	40
4.4.3	A kognitív módszer / La koniva (?) metodo.....	41

4.4.4	A humanisztikus módszerek / La humanaj metodoj .....	41
4.4.5	A módszerek jellemzése / Karakterizado de la metodoj .....	44
4.5	A KOMMUNIKATÍV OKTATÁS / LA KOMUNIKA INSTRUADO .....	44
4.5.1	A kommunikációról / Pri la komunikado .....	44
4.5.2	A kommunikatív irányzat értelmezései / Interpretadoj de komunika tendenco .....	46
4.5.3	Kommunikatív stratégiák / Komunikaj strategioj .....	47
4.5.4	A kommunikatív módszer / La komunika metodo .....	47
4.6	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO .....	48
5	AZ ESZPERANTÓ OKTATÁSÁNAK TÖRTÉNETE / HISTORIO DE LA INSTRUADO DE ESPERANTO .....	50
5.1	AZ ELSŐ KORSZAK 1887-1920 / LA UNUA EPOKO .....	50
5.1.1	Hogyan tanultak eszperantóul a poliglottok? / Kiel lernis Esperanton la poliglotoj? ..	50
5.1.2	A nyelvközvetítés és a nyelvtanulás az első korszakban / La lingvoperado kaj la lingvolernado en la unua epoko.....	50
5.2	A MÁSODIK KORSZAK 1920-1950 / LA DUA EPOKO.....	50
5.2.1	A Cseh-módszer / La Cseh-metodo.....	50
5.2.2	A nyelv tudatosítása / Konsciigo de la lingvo .....	54
5.2.3	A tanregény / La lernromano.....	54
5.2.4	Az irodalom mint gyakorlóterep / La literaturo kiel ekzercotereno.....	54
5.2.5	A nyelvközvetítés és a nyelvtanulás a második korszakban / La lingvoperado kaj la lingvolernado en la dua epoko.....	54
5.3	A HARMADIK KORSZAK 1950-1990 / LA TRIA EPOKO.....	55
5.3.1	Tanfolyamok / Kursoj.....	55
5.3.2	Tankönyvek / Lernolibroj.....	55
5.4	A NEGYEDIK KORSZAK KB. 1990 -/ LA KVARA EPOKO.....	63
5.4.1	Videó tananyag / Vidbenda instrumaterialo.....	63
5.4.2	Multimédiás számítógépes anyag / Multimedia komputa materialo.....	65
5.4.3	Internetes taneszközök portálja / La paĝaro de la interretaj lernmaterialoj.....	67
5.5	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO .....	74
6	AZ ESZPERANTÓOKTATÁS MÓDSZERTANÁNAK IRODALMA / LA LITERATURO PRI METODOJ DE LA INSTRUADO DE ESPERANTO.....	76
6.1	RAKUŠA .....	76
6.1.1	Az eszperantó jelensége / Kondiĉoj kaj problemoj .....	76
6.1.2	Általános módszertan / Ĝenerala metodologio.....	76
6.1.3	Nyelvpedagógia / Speciala didaktiko aŭ metodiko .....	76
6.2	SZERDAHELYI.....	80
6.2.1	A nyelvtanítás elmélete / La teorio de lingvoinstruado.....	81
6.2.2	A nyelvi anyag szelektálása és szegmentálása / La selektado kaj segmentado de lingva materialo.....	82
6.2.3	Az oktatás tervezése / La programo de organizado.....	83
6.2.4	Az oktatási-nevelési tevékenység / La programo de instru-eduka aktiveco.....	87
6.2.5	Az eszperantó iskolai oktatásának történeti áttekintése / Esperanto en lernejoj (historia trarigardo) .....	89
6.3	SZANSER .....	93
6.3.1	Általános nyelvészeti és módszertani bevezetés / Ĝenerala lingvistika kaj metodologia enkonduko .....	94
6.3.2	Az eszperantó oktatásának nyelvpedagógiai és speciális aspektusai / Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto instruado.....	97
6.3.3	A pszichológia válogatott kérdései / Elektitaj problemoj de psikologio.....	115
6.4	MELNIKOV.....	116

6.4.1	Az eszperantó oktatásában használt módszerek / Metodoj en la instruado de Esperanto	116
6.4.2	Az eszperantó oktatásának pszichológiai-didaktikai szempontjai / Psikologiaj-didaktikaj vidpunktoj en la instruado de Esperanto	122
6.4.3	Egy tanfolyam menedzselése / Manaĝado de kurso	127
6.4.4	Tanítás alatti oldott hangulat megteremtése / Kiel fari konvenan etoson dum instruado	129
6.4.5	A különböző készségek elsajátítása - általános tanácsok / Alproprigo de diversaj lertecoj – ĝeneralaj konsiloj	130
6.4.6	Szótanulás érdekesen / Vortlernado interese	132
6.4.7	Alkotó jellegű feladatok / Kreivaj taskoj	132
6.4.8	Ötletek a témák kidolgozásához / Ideoj por prilabori temojn	133
6.4.9	Összegzés / resumo	133
6.5	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO	134
7	A MÓDSZER KIVÁLASZTÁSA / ELEKTADO DE LA METODO	135
7.1	A MÓDSZEREK SORRENDJE: ELMÉLETI MEGFONTOLÁSOK / LA VICORDO DE LA METODOJ: TEORIAJ KONSIDEROJ	135
7.1.1	Az eszperantó esetében / En la kazo de Esperanto	135
7.1.2	Posztkommunikatív megközelítés / Postkomunika aliro	136
7.1.3	A módszerek használata a történelemben/La uzo de la metodoj laŭ la historio	136
7.1.4	A direkt és a kommunikatív módszer hasonlósága / La simileco de la rekta kaj la komunika metodoj	138
7.2	EMPIRIKUS VIZSGÁLATOK AZ ESZPERANTÓ ESETÉBEN / EMPIRIAJ ESPLOROJ EN LA KAZO DE ESPERANTO	139
7.2.1	Résztevők / La partoprenantoj	139
7.2.2	Eredmények az életkor függvényében / Rezultoj depende de la aĝo	141
7.2.3	Az egyes részvizsgák statisztikai jellemzői / La statistikaĵoj de la opaj ekzamenpartoj	142
7.2.4	Összehasonlítás más nyelvekkel / Komparado kun aliaj lingvoj	142
7.2.5	A vizsgaeredmények jellemzése / Kio karakterizas la ekzamenrezultojn	142
7.2.6	Vizsgafajták közötti kapcsolat / Konekso inter la ekzamentipoj (skriba respektive buŝa)	143
7.2.7	Szóbeli és írásbeli vizsgára való felkészülés hatása / La efiko de prepariĝo al buŝa kaj skriba ekzamenoj	144
7.2.8	A magyarról idegen nyelvre fordítás problémái / La problemoj de la tradukado el la hungara al fremda lingvo	145
7.3	AZ ANYANYELVÜNK SZEREPE / LA EFIKO DE NIA GEPATRA LINGVO	146
7.4	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO	146
8	A NYELVI ANYAG / LA LINGVA MATERIALO	148
8.1	A NYELVI ANYAG AZ ELSŐ SZAKASZBAN / LA LINGVA MATERIALO EN LA UNUA INSTRUPARTO	148
8.1.1	Minimális szókincs meghatározása spekulatív alapon / Determino de la minimuma vorttrezoro laŭ teoria konsidero	148
8.1.2	Minimális szókincs meghatározása statisztikai alapon / Determino de la minimuma vorttrezoro laŭ statistika esploro	149
8.2	CÉLOK AZ ELSŐ SZAKASZBAN / CELOJ EN LA UNUA INSTRUPARTO	151
8.3	OKTATÁS AZ ELSŐ SZAKASZBAN / INSTRUADO EN LA UNUA INSTRUPARTO	151
8.4	A NYELVI ANYAG A MÁSODIK SZAKASZBAN / LA LINGVA MATERIALO EN LA DUA INSTRUPARTO	152
8.5	TEMATIKUS-SZITUATÍV MODELL / TEMA-SITUACIA MODELO	152
8.5.1	Tematikus szituációs modell egy tankönyvben / Tema-situacia modelo en iu instrulibro	152

8.5.2	Tematikus-szituációs modell egy szótárban / Tema-situacia modelo en iu vortaro...	154
8.6	ÖSSZEFOGLALÁS / VORTARO.....	155
9	OKTATÁSI ESZKÖZÖK / INSTRUILOJ .....	156
9.1	A TANULÁSRÓL / PRI LA LERNADO.....	156
9.1.1	A módszerek jellemzése az információfeldolgozási felfogás szerint / Karakterizado de la metodoj laŭ la informprilabora koncepto .....	156
9.1.2	Az elérendő szint / La atingenda nivelo .....	156
9.2	A MOTIVÁCIÓ / LA MOTIVADO .....	157
9.2.1	A motivációk fajtái / La specoj de la motivado.....	157
9.2.2	A motiváció jellege / La karakterizado de la motivado .....	157
9.2.3	Az eszperantó tanulásának motivációi / La motivado dum lernado de Esperanto .....	158
9.2.4	Tanulási problémák / Problemoj dum lernado .....	158
9.2.5	Tanulási sikerek / Sukcesoj dum lernado .....	159
9.3	A MOTIVÁCIÓ ÉS A TANULÓI ÖNÁLLÓSÁG / LA MOTIVADO KAJ LA MEMSTARECO DE LA LERNANTO .....	159
9.3.1	Az autonóm tanuló / La aŭtonoma lernanto .....	159
9.3.2	A tanulói önállóság indokai / La kialoj de la memstareco de lernantoj .....	159
9.4	A TANULÓ ÉS KÖRNYEZETE MODERN ESZKÖZÖK HASZNÁLATAKOR. / LA LERNANTO KAJ LIA CXIRKAUXAJXO DUM UZO DE MODERNAJ RIMEDOJ.....	160
9.5	JÖVŐBELI LEHETŐSÉGEK / ESTONTAJ EBLECOJ.....	160
9.5.1	A gépi fordítás / La maŝina tradukado .....	160
9.5.2	Videofilmek / Vidbendaj filmoj .....	160
9.5.3	Feliratos film, DVD / Skribe dublitaj filmoj, DVD.....	161
9.6	AZ ELISMERT MÓDSZEREK FEJLESZTÉSÉNEK LEHETŐSÉGEI / EVOLUAJ EBLECOJ DE LA APLIKATAJ METODOJ .....	161
9.6.1	A Cseh-módszer alapján / Kaze de Cseh-metodo .....	161
9.6.2	A Zágrábi Módszer alapján / Kaze de Zagreba metodo .....	161
9.6.3	Természetes nyelvi dialógusrendszer / Naturlingva dialoga sistemo .....	162
9.7	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO .....	163
10	AZ ESZPERANTÓ TANÁRKÉPZÉS / FORMADO DE INSTRUISTOJ DE ESPERANTO.....	164
10.1	ESZPERANTÓ AZ EGYETEMEKEN / ESPERANTO EN LA UNIVERSITATOJ.....	165
10.1.1	Az eszperantó mint oktatott nyelv / Esperanto kiel instruata lingvo .....	165
10.1.2	Az eszperantó az oktatás nyelve / Esperanto kiel lingvo de la instruado.....	170
10.2	TUDOMÁNYOS KÍSÉRLETEK ELŐKÉSZÜLETEI / PREPARADO DE SCIENCAJ EKSPERIMENTOJ .....	174
10.3	ÖSSZEFOGLALÁS / RESUMO .....	175
11	FELHASZNÁLT IRODALOM / UTILIGATA LITERATURO.....	176-179

---

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) cê UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederl. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org)**  
**Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633, fakso: ++ 49-30-54 56 742, [dblank.gil@snafu.de](mailto:dblank.gil@snafu.de). Mendojn oni direktu nur al UEA, kontribuojn nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Bibliografiatas cêfe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.**

---